

DUMONATA REVUO/TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

Sonorilo

66A JARO, N-RO 3
MAJ.-JUN. 1974
BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St. Bernardsesteenweg 1078,
2710 Hoboken.
Postĉekkonto: 1634.34 de BEF, Oude Donkiaan 83,
B 2100 Deurne.
Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.
Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.
Ĉefredaktoro: Fernand Roose
Redakcia sekretario: Paul Peeraerts

KOTIZOJ DE BEF

Kadeta membro (ĝis inkl. 16-jara) : 45 fr.
Junula membro (17 - 25 j.) : 75 fr.
Simpla membro : 200 fr.
Familia membro : 75 fr.
Bonfaranta membro : minimume 300 fr.

La kotizoj estu pagitaj al loka grupo, kaj ne al la Federacia Kasisto. Listo de tiuj grupoj estas trovebla en "Esperanto-Panorama" kaj en "L'Esperanto en Marche".

NEKROLOGO

Kun ĉagreno la Antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo" anoncas la subitan morton de kara membro sinjoro Remy Van Eynde, estrarano dum multaj jaroj kaj fervora kunlaboranto. Sinjoro Van Eynde estis regula ĉeestanto de la semajnaj kunsidoj kaj prizorgis sennombrajn programojn, precipe filmprezentadoj, kiu fakte iĝis lia specialaĵo. Ankaŭ lia sperto sur la tereno de organizado de ekskursoj kaj promenadoj estis ĉie konata.

La 28-an de aprilo 1974 forpasis Ernest NATALIS, 76-jara, em. profesoro de universitato de Lieĝo, kie li instruis en la pedagogia instituto.

Li lernis Esperanton en 1909 kaj neniam li perdis la kredon je ĝia venko. Tre ofte li sub strekis la pedagogian kaj kulturan valoron de Esperanto. Li estis fame konata en la instruista mondo. Li verkis multajn librojn pri la edukaj sciencoj. En lia lasta verko (Kvaronjarcento da pedagogia literaturo) estis referaĵo pri la libroj en la L.I.



RABATO POR ESPERANTISTOJ

BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO en LIEGO (56a Belga Kongreso)

Dum la semajnfino de Pasko, Esperanto-oazo formiĝis en la moderna konstruaĵo de "Ramada" hotelo, situita apud ĉefbulvaro en la mezo de Lieĝo.

Nederlanda Asocio L.E.E.N., Luksemburga Esp. Asocio kaj Belga Esperanto-Federacio organizis komunan Esperanto-kongreson kiu sendube brile sukcesis kaj vekis sufiĉe rimarkindan atenton inter la loĝantaro. Pluraj ĵurnaloj raportis pri ĝi per ampleksaj artikoloj.

Sabate, ekde la 13-a horo, la laboremaj LKK-anoj jam viglis en la modernaspekta akceptejo de la hotelo.

En aparta poŝtoficejo oni povis akiri specialan stampon.

Antaŭtagmeze la fervojistoj jam kunvenis sub gvidado de S-ro L. De Sutter dum posttagmeze la belga sekcio de Int. Ligo de Esp. Instruistoj, gvidita de S-ro G. Pirlot, decidis pri sia statuto kaj preparolis la estontan agadon.

Vespere, je la 17a horo, la skabeno pri publika instruado, S-ro Rozet, akceptis la kongresanaron en la belega salonego de la urbodomo kaj oferis la honoran vinon post laŭdaj vortoj pri Esperanto kaj ĝia movado. D-ro P. Denoël, kiu prezentis la ĉeestantojn, dankis ankaŭ la skabenon per trafaj vortoj. Sekvis vizito al pluraj salonoj de la stilplena konstruaĵo sub gvidado kaj kun klarigoj de la skabeno mem.

Antaŭ la vizito gazetara konferenco estis organizita dum kiu pluraj lokaj ĵurnalistoj ĉeestis kaj montris neatenditan intereson.

Je la 20a horo, post komuna manĝo, distra vespero disvolviĝis en kiu la folkloraj muziko kaj dancado de la ensemblo

"Lu Gaw" el Verviers alternis kun prezentado de diapozitivoj - vere arte faritaj - pri vojaĝo tra Bretonio sub titolo "El la lando de Asteriks", realigita de Fr. Close. La teatraĵo "Fraŭlino Hortensa" donis al la familio Tholet la eblecon montri siajn teatrajn talentojn kun la helpo de kelkaj meritplenaj kunaktoroj, i.a. S-roj A. Heuschen kaj P. Dubois. Amuza spektaklo (tiel por la spektantoj kiel por la aktoroj) kiu plurfoje kaŭzigis "rid-eksplodojn".

Dimanĉe, je la 10a, dum la Beneluxa ĝenerala kunsido, S-ro Em. Gillet, prez. de la LKK, bonvenigis la gekongresanojn kaj transdonis poste la prezidanton de la kunveno al D-ro P. Denoël, interkonsente kun la aliaj landaj prezidantoj. Enkonduke li faris la historion de la Beneluxaj Kongresoj kaj invitis la prezidantojn de la kunorganizantaj asocioj saluti la ĉeestantojn.

Nome de Luksemburga Asocio, S-ro M. Ries, nome de L.E.E.N. S-ro J. Calado kaj nome de Belga Federacio, S-ro J. Verstraeten, alportis la salutojn de la respektivaj asocioj kune kun la gratuloj por la LKK.

Parolis nome de la francoj: S-ro R. Giloteaux, nome de la germanoj: S-ro H. Schütt, vicprezidanto en la LKK en la 59a Un. Kongreso en Hamburgo. Krom tiuj S-ro G. Pirlot reprezentis la belgan sekcion de ILEI dum S-ino J. Hoekstra aŭdigis mesaĝon de Eŭropa Esperanto-Centro kiu sukcesis interesiĝi "Civisme Européen" (ne-esperanto-asocio) tiagrade por Esperanto ke ĝi eldonis jam nun sian revuon, (kiu ĝis nun nur aperis en franca kaj angla lingvoj) ankaŭ en Esperanto. Oni instigis al grandskala abonigo.

S-ro E.J. Woessink prelegis pri la ĝenerala nuna situacio de Esperanto kaj ĝia valoro kiel laborlingvo en la landoj de EEK, ekzamenis la plurlingvecon en diversaj de tiuj landoj kaj la multajn obstaklojn kaj kontraŭajn opiniojn kiuj ankoraŭ regas nun.

D-ro P. Denoël proponis rezolucion kiun oni akceptis kaj kies teksto troviĝas sur alia paĝo.

Post komuna tagmanĝo en sferplena salono estis ebleco partopreni en gvidataj ekskursoj: tra la urbo (piede aŭ aŭtobuse) kaj al la Akvario.
Gvidantoj: S-roj S. Denoël, H. Dujardin kaj Em. Gillet.

Katolika Di-servo okazis en ŝipo - preĝejo sur Mozo, celebrata de Pastro A. Beckers. La tuta ceremonio (kun prediko) okazis en Esperanto meze de multnombra ĉeestantaro.

Vespere, festaspekta bankedo en agrabla sfero kun diversaj bongustaj antcipis la kongresan balon. Tie abundis la longrobaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj. Tombolo kun 75 premioj surprizige, sed agrable, interrompis la vivoplenajn konversaciojn kaj dancadojn.

Lunde, la lastan tagon, tuttaga ekskurso kondukis la kongresanojn per 3 aŭtobusoj tra la belega "Herva Lando".

Imponis la giganta "Turo de la Paco", memkonstruita dum pluraj jaroj de Roberto Garcet, filozofo kun propra vizio sur nia nuna civilizo kaj krome sperta geologo. La vizitantoj povis admiri en la turo veran muzeon kun multaj kuriozaĵoj.

La komuna tagmanĝo en Eben-Emael ege bongustis, ne nur pro la manĝaĵoj sed ankaŭ pro la pitoreska sfero kiun la salono elradiis.

Vizito al la cidro-fabrika "Ruwet", kie oni regalis la vizitantojn per glaso da freŝa cidro kaj kukajoj estis alia surprizo dum la ekskurso.

Dum akcepto en la urbodomo de Aŭbel oni denove prezentis glason da cidro kaj neatendita donaco je kies okazo la urbestro alparolis la ĉeestantojn. D-ro P. Denoël tradukis kaj dankis pro la multe prezita regalo. Ĉar estis preskaŭ la fino de la tuta organizado S-ro J. De Goeij el Nederlando kaptis la okazon, nome de la kongresanoj, danki la organizantojn de belega kaj sukcesplena kongreso.

Reveninte al Lieĝo, antaŭ la kongresejo oni adiaŭis kaj dissvarmis hejmen...

Agrabla kongreso forpasis dum sufiĉe bela vetero ...

Ek al sekvonta !!

Bonvolemulo

Migrado en Svisa Alparo

En la esperantista medio ne mankas eblecoj kunsidi, forumi, debati, ĉirkaŭveturi kaj aŭdi radion. Sed mankas okazoj por ekzerci la krurojn, forigi la bonstatan grason kaj iĝi bele bruna kaj sana. Pro tio SEJ organizas migradon en Svisa Alparo. Tiu internacia ekskursado okazos ĉe Gothardo-Montaro. La marŝado daŭros de 4 ĝis 8 horoj tage, kaj oni dormos en diversaj kabanoj laŭlonge de la vojo. La partoprenkotizo, inkluzive kolektivvan bileton, komunajn manĝojn kaj trinkaĵojn same kiel la loĝadon, estos inter 150.- kaj 200.- frankoj svisaj (laŭ la aĝo) por la tuta restado. - Krokodilado ne tolerata. - Se vi deziras havi pliajn informojn aŭ ricevi plenigendan aliĝilon, skribu al:

Somera Migrado / Daniel R. Mühlemann / Museumstr. 19 / CH-5200 BRUGG / Svislando

REZOLUCIO

La 200 partoprenantoj en la Beneluksa Esperanto-Kongreso, kunvenintaj en Lieĝo la 13-an kaj 15-an de Aprilo 1974,

EKSCIINTE, ke du membroj de la Eŭropa Parlamento, surbaze de propono de membro de la Franca Akademio, petis la Eŭropan Komisionon esplori la demandon, ĉu la latina lingvo taŭgas kiel lingvo de la Eŭropa Ekonomia Komunumo;

KONSTATINTE, ke tiuj sugestoj fontas el la aparte malfacilaj kaj komplikaj lingvaj rilatoj, kaj tio same interne de la institucioj kiel je nivelo de la rilatoj inter la ŝtatoj-membroj;

VARME APROBAS la vidpunkton, ke neŭtrala lingvo sen precipe nacia karaktero, tre faciligus la internaciajn rilatojn;

TAMEN ESPRIMAS sian skeptikecon pri la taŭgeco de la latina profunde transformiĝi en modernan lingvon alireblan al ĉiu persono;

DENOVE AKCENTAS - kaj pravas tion unu fojon plie per la organizado de la nuna kongreso okazinta nur en la internacia lingvo - ke Esperanto plenkreskiĝis kaj fariĝis vivanta lingvo dank'al praktika aplikado dum pluraj jardekoj;

SUGESTAS al la oficialaj instancoj, al la superaj instru-aŭtoritatoj, kaj al ĉiuj reprezentantoj de la inform-medioj, konsciiĝi pri ĉiuj eblecoj proponitaj de la internacia lingvo por pli harmonia funkciado de la internaciaj institucioj kaj por pli bona komunikado inter la popoloj.

R E C E N Z O

JAKOBO LORBER - La Korespondado de Jezuo - Broŝuro 14.2 x 10.4 - 44 - paĝoj

El la evangelioj ne evidentiĝas ke Jezuo postlasis skribaĵojn. Nur en la apokrifaj tekstoj temas pri letero de Jezuo al Princo Abgar de Edessa en Mesopotamio.

En tiu ĉi broŝuro oni trovas la kompletan rivelitan korespondadon inter Jezuo kaj la princo kiu estis granda admiranto de la Disinjoro, dum lia vivo.

En ĝi troviĝas belaj pripensadoj kaj normoj kiujn oni pli trafe retrovas en la evangelioj. Ŝajne tiu dokumento de la kristanismo longe malaperis, sed estis rivelita al la homaro pere de la aŭtoro Jakob Lorber.

Kurioza libreto al ĉiu, kiu volas profundiĝi en la naiva randhistorio de la kristanismo.

E.P.

LA TEMPESTO, William Shakespeare, trad. Kalman Kalocsay; 119 p., 7,20 gld.; Beletraj kajeroj de Stafeto, 40

Ne nur ĉiuj intelektuloj sed ankaŭ multaj nekleruloj agnoskas, ke Shakespeare estis kaj restas la plej granda verkisto. Tamen, sincere dirite, kiom, - eĉ el la plej kleraj - legas liajn verkojn?

Kaj ne mirinde: simple tralegi Ŝekspiran teatraĵon ne estas: lia teksto postulas grandegan penon vortarkonsultan kaj esploran, veran pristudan koncentriĝon, sen kiuj nek kompreni nek ĝui ĝin estas

tas eble. Krome, ni scias ankaŭ kiel rifuzeme la leganta publiko generale sintenas al poezio kaj al dramoj.

Kiel konvinki tiujn pentimajn legantojn, ke ankaŭ poezio esence estas prozo; prozo al kiu la verkinto donis alian engaĝigon nur por plievidentigi la ritmajn kaj la sonvalorajn kvalitojn de la teksto; kiel persvadi ilin, konsideri dramon ne kiel terurajon sed simple kiel bonan dialogon - kvankam, verdire, pli ol du personoj emas enmiksiĝi al "konversacio"... por brili per elokvento.

Nu, persvado ne estas mia tasko. Kaj tiu alia... taskego: la deĉifrado de la Ŝekspira lingvaĵo - faris ĝin Kalocsay domagante nenian klopodon. Jam ne necesas esplorado kaj studado: prenu la tradukaĵon kaj eklegu... en klara Esperanto.

Jen la tria Ŝekspira dramo, kiun nia konata genia verkisto kaj tradukanto K. Kalocsay

transvestis per riĉa Esperanta robo. Laŭdire li asertis, ke post Shakespeare ĉio alia ŝajnas griza. Ni komprenas, ke li nepre enamiĝis al la arto de lia granda Anglo.

Laŭdinda ipiciato, tiu ĉi nova traduko! Ĝi ne nur pliriĉigas nian literaturon per plia valoro, sed estas vere utiliga al ĉiuj Shakespeare-ŝatantoj; kaj ankaŭ al tiuj "kompatindaj" studentoj kiuj devigite legadas lin, nun ili disponas gravan helpilon.

La traduko, kvankam fidela kaj, kiel la originalo, altkvalita stile kaj lingve, facile legiĝas kaj montriĝas tuj komprenebla. Kontraŭe mi konfesas, ke la anglan tekston mi ne povas nomi "legebla" samsence: plurloke ĝia lingvaĵo estas nepenetreble armita per diversaj specaj malfacilaĵoj.

Evidente ankaŭ en Esperanto Shakespeare ne subite ŝanĝiĝas al mensfuraĝo por komencantoj. Ankaŭ ĉi tiu traduko estas kulmino de arto. Pro precizeco, pro belsoneco aŭ pro bonritma flueco de frazo K.K. uzadas neologismojn; tion neniu rajtas riproĉi al li. Ricevante bonegan tradukon, kiu certe ne estis sen longa pena laborado far' de majstro beletra, ĉu ni ne prave hontus kritiki detaleton? Male ni komprenas, ke sen allaso de kelkaj licencoj oni cedperdus artajn kvalitojn.

"La Tempesto" ne enviĝas inter la tragedioj (el kiuj la plej famaj estas Hamleto, Reĝo Lear, Otelo kaj Makbeto), sed inter la komedioj. Oni supozas, ke ĉi tiun Shakespeare verkis laste - kun la intenco fini per ĝi sian karieron de dramverkisto. Ĝi estas plena je amara saĝo kaj konsiderebla kiel "dramo de perditaj iluzioj".

La Tempesto estas fabelaĵo, kies enhavo estas resumebla kelklinie: Duko, ŝatanto de libroj, estas tiel absorbata de siaj studoj, ke li estas perfidita de sia frato kaj ekzilita kun sia filino. Finfine li sukcesas per sorĉarto "instrui" la krimulojn kaj "konverti" ilin al pli nobla vivkonduco.

Shakespeare sendube kritikis la korupton, kiun li daŭre vidis ĉe la kortego. La karakteroj de la ĉefpersonoj estas ĉiam bone elpentritaj, ofte pli per la agado ol per vortmulteco.

En la postparolo de la libro aldoniĝis pluraj interesaj kaj instruaj sciindaĵoj pri la verkaro de la aŭtoro.

(mallongigita)

C.R.A.D.

ESPERANTISTA KULTURDOMO EN GRESILLON

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare estos organizitaj en la esperantista kulturdomo en Grésillon diversaj aranĝoj. Jen sekvas la programo por la someraj ferioj:

De la 1-a ĝis la 21-a de julio

Kulturaj esperantistaj semajnoj kun la jena tagordo:

9 h. 30 - 12 h.: kursoj trigradaj

14 h. - 16 h.: bindado de libroj, korbofarado

18 h. - 19 h.: konversacio

21 h.: distraĵoj

Ekskursoj okazos la 10-an kaj 17-an de julio.

De la 22-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto

Internaciaj semajnoj sub la temo "La homo kaj la maŝino".

Programo:

10 h.: prelegoj

14 h.: bindado de libroj, korbofarado

17 h.: diskutoj pri la prelegoj

21 h.: distraĵoj

Ekskursoj okazos la 26-an kaj 31-an de julio kaj la 7-an de aŭgusto.

De la 12-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro

Studsemajnoj kun la sama programo kiel dum la antaŭa periodo. Ekskursoj okazos la 21-an kaj 28-an de aŭgusto.

Informojn kaj aliĝon petu de: Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé, Francujo.

21-jara studento pri botaniko deziras korespondi kun iu en Belgio. Liaj nomo kaj adreso estas: László Hornyák, H-3201 Gyöngyös, Mátraí u. 36, Hungarujo.

Jus aperis la unua kursoteksto rilate la duan SUK-sesion (04.-25.08.1974). Temas pri la 88-paĝa verko "Planktono kaj mara produktado" de Prof. Enrique Balech, estro de la Hidrobiologia Stacio de Quéquén.

Aparte interesaj ĉapitroj certe estas jenaj: fotosintezo de la fitoplanktono, vertikala distribuado de la planktono, la homo kaj la planktono, la planktono kiel oceanografa indikato, pri la kapabloj de de la maroj subteni la homaron ktp. Evidente, la aŭtoro donas specialan atenton al aspektoj elstare gravaj en nia tempo.

Tiu ĉi scienca teksto sekvas kiel studlibro por la partoprenantoj de la samtitola kurso kiun la aŭtoro mem prezentos kadre de la biologia sekcio dum la Someraj Universitataj Kursoj en la Universitato de Liège. Kompreneble, la kajero ĵus publikigita estas plia riĉigo de la naturscienca literatura verkita en la Internacia Lingvo.

La ordinara prezo de la nova teksto estas 320,- belgaj frankoj (aŭ 33 internaciaj respondkuponoj), sed studentoj ĝuas rabatitan prezon kaj pagos 160,- bf (aŭ 17 i.r.). Kiel ĉiuj kursoteksto de SUK ankaŭ tiu ĉi estas rekte mendebla ĉe la SUK-adreso (Boite Postale 9, B-4000 Liège 3).

Ni multobligos novajn listojn de la sonbendamikoj de la tuta mondo en Aŭgusto de tiu ĉi jaro kaj petas, ke sonbendamikoj sendu detalojn al ni pri magnetofonoj, ĉefintereso k.t.p. antaŭ la fino de Julio.

La novajn listojn ni volonte sendos kontraŭ respond-kupono.

SONBENDAMIKOJ
2 Shagbrook Cottages
Buckland Road
Reigate, Surrey
Britio RH2 9RE.

Por ĉiuj viaj asakuroj kaj reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co P.V.B.A.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Agentejo en Nederlando:

ROTTERDAM, Korte Hoogstraat 9

Telefono 1142 19 - Telekso 23243 - Telegr. "Pemwem"

Reprezentita en Londono kaj ĉe "Lloyd's of London".

Korespondantoj en la tuta mondo

Unuaklasa servo

Kompetentaj fakuloj

KORESPONDO EN ESPERANTO

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631

Hoboken

Vitraloj - Speguloj -

„securit“ vitro

kolorigitaj vitroj

aluminiaj senmastikaj

stangoj por kupoloj

Vitro-cementoĵoj por

tutvitra-konstruaĵoj

mastiko

Telefono 272875